

Walter Klag
Alfred Heiligenbrunner
Irene Klag
Vida Kulikauskienė
Júlio Pedrosa

SAT.IROJ

mok!
mok!
mok!



Naŭa kajero

Unua eldono Vieno 2020
ISBN 978-3-903247-29-1
Nevendebla, privata eldono

La aprokaciajn desegnaĵojn faris
Wilhelm Busch
[vilhelmo buŝo]

Foto sur la kovrilpaĝo:
Walter Klag, Helsinko 2019



Por Sat.iroj 10 ni urĝe serĉas kontribuantojn.
Bonvole skribu al la eldonejo
Rudolfingasse 8/11, 1190 Wien, Aŭstrio
esperanto@chello.at
Danko eterna estas garantiota!

HAVO ENA

ŜERCOJ

PAROLAS LA MAJSTRO

ALBUMO FINVENKA

LA SISTEMO KLERIGA EN APRIO-KAKANIO

ŜERCOJ DE ALFRED

Recepto por fungoj.

Li: „Ho, la manĝaĵo kun fungoj tre bongustis! De kie vi prenis la recepton?”

Ŝi: „El krim-romano.”

La piedpilk-spertulo fiere hejmenvenas.

„Hodiaŭ mi sukcesis fari du golojn!”

„Kaj kiel finiĝis la ludo?”

„1:1”

„La piedpilka ludo finiĝis 0:0!”

„Kaj kiel estis la stato je duontempo?”

Jen la vero: La ludo komenciĝas, la stato estas 0:0!

Post seksumado diras la viro al la virino:

„Karulino, ĉu vi kelkfoje dezirus esti viro?”

Virino:

„Ne. Ĉu vi?”

Diras la klarvidistino: „Via edzo baldaŭ mortos violentan morton.”

Klientino: „Kaj mi? Ĉu tribunalo kondamnos min?”

Pro kio anaso havas naĝ-haŭtojn inter la piedfingroj?

Por pli bone estingi fajron.

Pro kio elefantoj havas simplajn dikajn piedojn?

Por pli bone estingi brulantajn anasojn.

En armeo kriegas la oficiro: „Kiu el vi estas muzikema?“

Soldato: „Mi.“

Oficiro: „Bone. Vi portu la pianon en la kazon!“

Demandas viro sian edzinon: „Ĉu vi jam foje vidis viron kaj deziris, esti ne denove edziniĝata?“

Ŝia respondo: „JES, ĉiun matenon!“

Du amikinoj.

- Ĉu vi jam scias pri la malfeliĉo kiu okazis al Maria?

- Ne, kara. Kio okazis al ŝi?

- Ŝi fuĝis kun mia edzo!

(El la portugala esperantigis Júlio Pedrosa.)

PLIA ŜERCO

Policisto: Mi ar-arestas vi-vin pro eb-brieco!

Aŭtisto: Sed mi ne drinkis alkoholon!

Policisto: Sed MI!

PAROLAS LA MAJSTRO

Ne ŝovu vian nazon en fremdan vazon.

Al kokino la ovo lecionojn ne donu.

Barbo potenca, sed kapo sensenca.

ALBUMO FINVENKA

superba

FOOD + BREAD






Trovita de Irene





Vieno, Himmelpfortgasse





KOMUNUMA

Komunuma, "community" or "commune" in Esperanto, the language of cooperation, is the name of a site occupying nearly 11 000 square metres in Romainville, where five Parisian galleries set down roots in 2019.

Neues Galeriequartier Komunuma eröffnet.

Vier Pariser Galerien haben sich zusammengeschlossen, um ein ehemaliges Industrieareal im wenige Kilometer östlich von Paris gelegenen Ort Romainville zu einem Kunstquartier zu entwickeln. In dieser Woche wurde „Komunuma“ eröffnet, die Wortschöpfung aus dem Esperanto bedeutet Gemeinschaft.



MONTEGO

Kurzmantel mit Stehkragen



MARSANO

BLUMEN



mojosa – so erreichst du uns:

Zamenhofgasse 8/3/R1
1110 Wien



Viridiflora Tulpe 'Esperanto'

Trovita de Vida



TRANKVILE electric vehicles



Collection by **TRANKVILE electric vehicles**

Electric Motorcycles / Electric Scooter / Electric Bikes Innovative Products / Senioren / Handicaped people Elektroroller, Behindertenfahrzeuge



gesundheitstageECKERNFÖRDE
gesund,aktiv,leben

Electric Scooter Electric Cars Ems Teci >

gesundheitstage-eckernfoerde

ZERO DS
DUAL SPORT

Electric Scooter Electric Cars Motorcycle >

Zero DS - A fully electric motorcycle designed to be agile in the dirt and

TRANKVILE electric vehicles

Geräuschlos und klimafreundlich sollen die elektrobetriebenen Kick Scooter und E-Roller durch die Straßen gleiten. Das ist auch das, was der Name des neuen Shops, TRANKVILE, übersetzt meint: Der Name komme aus dem Esperanto und bedeutet Ruhe und Gelassenheit.

LA SISTEMO KLERIGA EN APRIO-KAKANIO

DAŬRIGO DE KAJERO 8



Aprio-Kakanio estas eta federcia lando. Tie vivas du etnoj: La kakanoj kaj la aproj. Ili havas komunan, sed malfacile ellerneblan aprokakanan lingvon, sed diversajn etnajn festotagojn.

La lando estas ne tre konata en la mondo, sed ja ties kleriga sistemo, kiu estas la plej bona en la universo. Tio estas la merito de la jam 61 jarojn reganta Socialnaciema Partio, sed ankaŭ de la eminenta kleriga ministro, ties saĝaj ministeriaj oficistoj kaj de la inteligentaj lernejoj direktoroj, kiuj estas senescepte ĝismedolaj membroj de la Socialnaciema Partio.

* La nedevige vizitebla lerneja fako „korusa kantado“ estis tre ŝatata. Por pligrandigi ties popularecon oni ŝanĝis la nomon al „koruso“. Tio estis la ideo de la partiestro de la Socialnaciema Partio, kiu ricevis grandan laŭdon de la ŝtata prezidento kaj grandan ordenon.

* La inaj kaj viraj instruistoj preskaŭ ĉiutage ricevas kelkajn oficialajn dekretojn de la kleriga ministerio. Ĉar la nombro de la dekretoj estis tro granda, oni decidis jene: La malgravaj dekretoj estu presitaj sur blankan paperon, la gravaj sur ruĝan. Bedaŭrinde la geïnstruistoj ne legis la ruĝajn dekretojn. Tial la ministro instalas konsilantan komitaton, kies membroj estas

po tri instruistoj el ĉiu lernejo. Okaze de la 250a kunsido de tiu grava komitato organiziĝis pompa solenaĵo. Pro la diligenta, celkonscia laboro de la komitato la partiestro ricevis laŭdon de la ŝtata prezidento kaj grandan oran ordenon. Ĉiuj komitatanoj ricevis arĝentan ordenon.

Pro manko de ruĝa papero oni devis presi kelkajn gravajn dekretojn sur blankan paperon. Sur tiuj oni legis:

ATENTU!
TEMAS PRI RUĜA DEKRETO
SUR BLANKA PAPERON!




Ĉu vi pensas, ke tiu historieto estas pura fantazio? [Verkita en Aŭstrio].

WK



Stulte
rigardi
povas
čiu





Preskaŭ eblas! Fotita dum la UK en Lahtio 2019



Ŝercojn?
Ne!
Ĝis!